# Statuto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio(IKEF)

(Aprobita de la Unua Komuna Konferenco de IKEF dum 2017-07-20/22 en Seulo)

1. **Celo**: Utiligo de Esperanto por komerco kaj ekonomio. Konstruado de aplika sistemo de Esperanto paralele al la tradicia Esperanto-movado.
2. **Strukturo kaj kotizo**: IKEF konsistas el filioj landaj kaj fakaj, membroj entreprenaj, individuaj, interretaj kaj dumvivaj.

2.1. **Landaj kaj fakaj filioj** konsistas minimume el 5 siaj membroj, kaj nuntempe ne pagas la kotizon, sed havas devon inviti la jarkunvenon de IKEF. La prezidanto de ĉiuj filioj aŭtomate fariĝas estrarano de IKEF.

2.2. **Entreprena membro** pagas sian jarkotizon por 100EUR, kaj senpage prezentas kaj reklamas sian varon okaze de la jarkunveno de IKEF kaj pere de retgrupoj kaj informiloj de IKEF.

2.3. **Individua membro** pagas sian jarkotizon por 10EUR, kaj rajtas fariĝi kandidato de la estrarano de IKEF. Se ĝi ne daŭre pagis dufoje, aŭtomate fariĝis la interreta membro.

2.4. **Interreta membro** ne pagas jarkotizon, sed devas pagi aliĝkotizon unufojan por 10EUR kaj aliĝi al IKEF-retgrupoj (komerco@googlegroups.com) aŭ (per-esperanto-komerco@yahoogroups.com).

2.5. **Dumviva membro** pagas totalan kotizon unufoje por 200EUR.

3. **Estraro kaj respondeco**: Ĝi konsistas el la honora prezidanto, prezidanto, vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, estraranoj el siaj filioj kaj individuaj membroj. La honora prezidanto estas nur titola pro sia kontribuo al IKEF, prezidanto planas la jarlaboron kaj inspektas financon de IKEF; vicprezidantoj respondecas apartan kontinenton aŭ fakan agadon; ĝenerala sekretario zorgas ĉiutagan taskon ĉefe por kolekti la membrokotizon kaj eldoni informilon Merkato(PDF); estraranoj respondecas sian agadon landan aŭ fakan. Ĉiu filio rajtas havi siajn delegitojn sublandajn aŭ subfakajn. La unu periodo de la prezidanto estas por 4 jaroj.
4. **Jarkunveno kaj kunsido**: La oficiala jarkunveno estas la komuna konferenco de IKEF. Dum la jarkunveno la prezidanto kaj ĝenerala sekretario raportas siajn laborojn. Ĉiu filio rajtas havi sian jarkunvenon aŭ kunsidon kadre de sia lando aŭ fako, kaj rajtas aperi en diversaj okazoj nome de IKEF cele por propagandi nian IKEF.
5. **Statuta korektigo**: Ĉi tiu statuto estas korektebla okaze de la jarkunveno.

Ekvalida de la 22a de Julio 2017

Subskribita de prezidanto Chielismo WANG Tianyi

Chielismo 王天义

IKEF